
KONGRESA KURIERO

# DRAKO DE BRNO

2

2025-07-27

de la 110-a Universala Kongreso de Esperanto en Brno 26 julio – 2 aŭgusto 2025



## Parolado de Reprezentantino de la Familio Zamenhof

**Margaret Zaleski-Zamenhof**

**Karaj kongresanoj, organizantoj, gastigantoj, geamikoj,**

Kiel reprezentantino de la familio Zamenhof, mi sentas profundan honoron partopreni la **110-an Universalan Kongreson de Esperanto** ĉi tie en **Brno**. Estas kortuŝe vidi, ke pli ol jarcenton post la unua kongreso, la ideoj de mia praavo, **Ludoviko Zamenhof**, daŭre vivas — ne kiel rememoro pri la pasinteco, sed kiel **vivanta movado**, respondeca kaj agema fronte al la defioj de nia epoko.

La temo de ĉi tiu kongreso — *Esperanto kaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj* — profunde resonas en mi. Esperanto naskiĝis el **sopiro por interkompreno kaj paca kunesto**. Teknologioj hodiaŭ estas modernaj iloj, per kiuj tiuj idealoj povas disvastiĝi pli vaste ol iam antaŭe.

Evidente mia praavo ne havis interreton. Li ne povis imagi inteligentan telefonon aŭ babilejojn kun homoj el la tuta mondo. Tamen li revis pri mondo, kie homoj interparolas kiel **egaluloj — sen timo kaj sen malestimo**. Ĉu ne estas ĝuste tio, kion teknologio hodiaŭ ebligas — kondiĉe ke ni ĝin uzas respondece?

Mi pensas ankaŭ pri mia **patro, inĝeniero**, kiu konstruigis pontojn. Mi ne forgesas liajn vortojn, kiuj akompanas min ĝis hodiaŭ. Kiam mi estis eta knabino, li diris al mi:

"Kiam mi konstruigas ponton, mi devas poste pasi sub ĝi. Kaj se mi malbone laboris, la ponto falos — kaj vundos min."

Per tio, li instruis al mi, ke vera respondeco ne estas nur plenumi taskon, sed **konscii, ke niaj agoj havas sekvojn** — kaj ke oni devas esti preta alfronti ilin.

Konstrui ponton inter homoj, ĉu pere de lingvo, ĉu pere de teknologio, postulas la **saman respondecon**. Se ni estas atentemaj, la ponto de fido restos firma.

Teknologioj donas al ni rimedojn: ni povas tuj **paroli kun homoj tra la mondo**, kundividi ideojn, kunlabori sen fizikaj baroj. Sed teknologio estas nur ilo. Ĝi ne garantias komprenon, kaj certe ne aŭtomate alportas fidon.

Male, misuzata teknologio povas nutri malkonfidojn, **pligrandigi dividojn**, kaj eĉ instigi konfliktojn. Sociaj retoj povas disvastigi malamon, misinformado povas manipuli homojn, kaj aŭtonomaj armiloj povas funkcii sen homa konscio. Sen **etikaj gvidprincipoj**, artefarita inteligenteco riskas ne nur speguli, sed ankaŭ akceli ekzistantajn maljustecojn.

Tial ni bezonas **Esperanton — ne nur kiel lingvan solvon, sed kiel kulturan kaj etikan proponon**. Ĝi montras ke interkompreno eblas sen hegemonio, ke lingvo povas esti ilo de **egaleco, ne de dominado**.

Ni, **esperantistoj**, scias vivi kun malsamuloj en respekto. Kaj nun estas la momento por kunporti tiun sperton al la mondo — ankaŭ pere de teknologio.

Ni povas uzi nian lingvon en **interretaj projektoj**, en **malfermitaj lern-platformoj**, en **artefarita inteligenteco**. Sed ni devas esti aktivaj — pontoj ne konstruiĝas solaj.

Ni devas, kiel mia patro, atente rigardi la **fundamentojn de la pontoj**, kiuj konektas nin al aliaj homoj. Kaj se ni vidas fendojn — miskomprenojn, maltoleremon, malegalecon — ni devas ne ignori ilin. Ni devas labori por **ripari, por plifortigi, por firmigi la fidon**.

**Do mi alvokas vin**: ni uzu teknologion ne nur por rapideco, sed por **respekto**. Ni uzu Esperanton ne nur por paroli, sed por **aŭskulti**. Kaj ni restu **konstruantoj de pontoj** — ĉar la mondo bezonas pontojn. Kaj la mondo bezonas nin.

*El mia koro, mi dankas vin kaj deziras al vi inspirplenan kaj memorindan kongreson.*

---

# Grava sciigo:
# Sankta meso je la 17h30

Sankta meso okazos dimanĉon, la 27-an de julio je la 17h30 en la preĝejo Sanktaj Johanoj (kostel sv. Janů), Minoritská 469/1. Antaŭ la Sankta meso, je la 17h00 okazos en la sama preĝejo la Ekumena diservo.
La preĝejon oni facile atingas de la kongresejo trame, numero 9 (eliru ĉe la haltejo Zelný trh, piediru laŭ strato Orlí, kaj la unua maldekstre estas Minoritská.

Marija Belošević, KN 164

# Eraro en la papera Kongresa Libro pri 2 koncertoj

Bv. atenti, ke en la priskriba parto de la "Arta programo" (p. 115 kaj 117) aperis malĝusta tempo/loko de du koncertoj:
1. ***Amira Chun*** koncertos **marde, je 15h15–16h30** en **Höger.**
2. ***ĴeLe*** koncertos **marde, je 17h00–18h00** en **Höger**.
(En la tabela programo la koncertoj aperas ĝuste.)

# Esperanto en ĉeĥaj amaskomunikiloj

***Esperantistoj el la tuta mondo celas al Brno*** estas titolo de artikoleto en la gazeto Mladá fronta DNES de la 25-a de julio 2025 sur la titolpaĝo de la sudmoravia rubriko.

***En la Esperanto-kongreso en Brno alparolos la partoprenantojn eĉ Cimrman-aktoroj.*** Sub tiu titolo aperis artikolo en la sabat-dimanĉa gazeto Právo.

Peter Baláž kaj Marek Blahuš parolis ĵaŭde en viva intervjuo en **Ĉeĥa Radio Brno**.



Male al nia kongreso venis ĵurnalistoj por gazetara konferenco:



## Eraro en la mapo

En siaj sakoj la kongresanoj ricevis *Malgrandan gvidilon tra Brno*, bedaŭrinde kun erareto en la mapo. Konfuzitaj estas la Templo de Sankta Jakobo (n-ro 5 en la mapo, sed 7 en la tabelo) kaj Kirko de Johano Amoso Komenio (7 en la mapo, 5 en la tabelo). En la Kongresa Libro tiu ĉi preĝejo nomata popole *Ruĝa preĝejo* pro ruĝaj brikoj havas adreson *Opletalova 6*, sed tie troviĝas la paroĥejo. La preĝejo mem estas en *náměstí Komenského* (placo de Komenio) kaj estas ĉefa dominanto de tiu urboparto, nepretervidebla.




## Surskriboj en la manĝejo

**Masitá jídla** Viandaj manĝoj
**Teplá jídla** Varmaj manĝoj
**Přílohy** Garnaĵoj (terpomoj, rizo k.s.)
**Polévky** Supoj
**Grill Bar** Burgeroj

## Ĉeĥa Radio Brno

elsendos dimanĉe ekde 14h00 ĝis 16h00 programon pri Verda Stacio, la iamaj esperantlingvaj elsendoj el Brno.

## Fumantoj

estas petataj ne fumi antaŭ la enirejo, kie estas zono por ripozantoj.

## Parkado antaŭ la kongresejo

La strato antaŭ la kongresejo apartenas al t.n. bluaj zonoj, kie oni rajtas parki senpage inter 6-17h, dum inter 17-6h (nokte) oni devas pagi. Kaŭzo estas, ke vespere revenas lokuloj, kiuj dum la tago estis en laboro, kaj bezonas parki antaŭ sia domo. **Sabate kaj dimanĉe senpage.**

## Movada Foiro

Sur ĉirkaŭ cent tabloj diversaj Esperantaj asocioj kaj institutoj prezentis sian agadon. La intereso estis tia, ke la koridoron preskaŭ ne eblis trairi. Pro necerta vetero oni preferis okazigi ĝin endome.



## Ivan Acher, Vanda Šípová :: Esperados

Oper-arioj en Esperanto estos prezentataj de ilia aŭtoro Ivan Acher kune kun la bonega kantistino Vanda Šípová. La komponisto uzas Esperanton jam pli ol 15 jarojn en sia verko por ĉeĥaj kaj eŭropaj teatroj kaj filmoj. Li parolas pri Esperanto kiel unu el la plej melodiaj lingvoj kaj uzas ĝin amplekse ne nur en sia sukcesa opero Sternenhoch ĉe la Nacia Teatro en Prago, sed ankaŭ por tuta gamo da aliaj muzikaj ĝenroj kaj stiloj kaj kantotekstoj. Ĉi-foje estos elekto de oper-arioj el la prezentadoj de tri gravaj teatroj: La Nacia Teatro en Košice, la Nacia Teatro en Brno kaj la Nacia Teatro en Prago. Kiel aldonaĵo estos prezentita ankaŭ ario el Rusalka (Najado) de Antonín Dvořák.

## Esperanta akvofalo

ĉe Moravia placo (Moravské náměstí) antaŭ la Teatrejo de Janáček (Janáčkovo divadlo) propagandas nian kongreson:




## Prelego pri elstara ĉeĥo

Francisko Valdomiro Lorenz: mardo, 14h30, salono Urbanová.
Joao KN 78

## Nova vortaro

Ni ĝoje anoncas, ke aperis la **Angla-Esperanta-Ĉeĥa versio de la tem-vortaro** de Ilona Koutny, kie eblas trovi ankaŭ ĉapitron pri utilaj komunikaj frazoj, kiujn vi povas bone uzi dum via restado en Ĉeĥio. Pri la temo vi povos aŭskulti IKU-prelegon de Ilona Koutny kaj Milan Kolka dimanĉe je la 16h45. Lunde je la 16h30 dum la aŭtora duonhoro venos ankaŭ la aŭtoro de la ĉeĥa versio Miroslav Malovec.

**la aŭtoroj**

**Redaktoro:**
Miroslav Malovec
Sendu viajn kontribuojn al
drako@esperanto.cz

**Provleganto:**
Marek Blahuš